08: Renkontiĝo en Halle (Saale) Halle-ana 2014 (pli frue Ana-Bel), rendevuejo inter 10:00 - 11:00 horo en Lounge en la ĉefstacidomo, Inf.: Hans-Joachim Gunkel, rete: HajoGunkel@t-online.de

Solvo al la konflikto pri *-ujo/-io*?

Nun estas en preparo nova asocia retejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Tio estis kaŭzo por 84 konataj Esperantistoj, subskribi petskribon al la estraro de UEA, por ke tiu decidu, uzi en ĝi la klare distingeblan sufikson *-uj* por landonomoj, anstataŭ *-i*, kies uzon ili konsideras malkongrua kun la nobla misio de la organizaĵo.

Mi subskribis tiun peton, sed konscias, ke ĝi ne estis diplomateca. Ne povas temi pri anstataŭigo de *-io*, konsiderante la fakton, ke la Akademio de Esperanto en 1974 decidis „lasi al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo“. Tamen mi komprenas la indignon de Fundament-emaj esperantistoj pro tiu decido de la Akademio.

Laŭ la Antaŭparolo al la Fundamento la Akademio nur povas proponi novan formon aŭ regulon, se la tradicia formo aŭ regulo estas „tro ne-oportuna“. La ideo, ke la sufikso *-uj* estas „tro ne-oportuna“ venas de Hector Hodler. Li pensis, ke li kiel redaktisto de la revuo *Esperanto* povas aŭtoritate decidi pri ŝanĝo de Fundamenta sufikso. Sed tion rajtas nur la Akademio de Esperanto. Ankaŭ en 1974 la Akademio ne proponis ŝanĝon en la statuso de *-ujo*, nek rekomendis *-i* kiel sufikson. Ĝi nur allasis ĝin.

Poste en 1985 la Akademio avertis, ke oni nur uzu *-io*, se tio kreas pli internacian formon. Tio signifas, se Esperantistoj akceptus tiun decidon, ke ili ne plu uzu la landonomojn Britio, Danio, Francio, Grekio, Norvegio, Portugalio, Svedio, Svisio, Ukrainio, ĉar ili ne estas internaciaj formoj!

Kial tiu modera sinteno de la Akademio de Esperanto ne estis ĝenerale respektata?

Imagu, ke grupo de malkontentaj ĵurnalistoj de *Frankfurter Zeitung* aŭ *Le Monde* ŝanĝus erojn de la ortografio en sia ĵurnalo. Tio tuj vekus fortan reagon de legantoj kaj multaj abonantoj malabonus tiun ĵurnalon¹. Same instruistoj aŭ magistratoj ne povus ŝanĝi la ortografion aŭ alian aspekton de la lingvo. Ili riskus maldungon. Ĉu la germana kaj franca lingvoj evoluas libere? Jes, sed rigore organizite, laŭ la eldiro „Lingvo estas dialekto kun armeo kaj militŝiparo“ (Max Weinreich, 1945). Same ekzistas mekanismoj en Kroatujo por konvinki vin, ke pano estas „krug“, sed trans la limo kun Serbujo pano

estas „hleb“. Ambaŭ landoj havas armeon. Esperanto konsistas el multaj dialektoj, ĉar oni havas nek armeon, nek eĉ aŭtoritatan Akademion. Vi, Esperantistoj, ne estu fieraj pri manko de organiziteco por gvidi la evoluon de la lingvo, ĉar pro tio la unueco de la lingvo estas daŭre en danĝero.

En la ĵusa kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio² rezolucio esprimis la bedaŭron de la kongresintoj, ke la Itala prezidanteco de Eŭropa Unio decidis, uzi nur la anglan kiel komunikan lingvon en sia retpaĝaro kaj tiel rompi longjaran tradicion, almenaŭ uzi tri komuniklingvojn: la anglan, la francan kaj la germanan. Oni ankaŭ rimarkis la konsternan fakton, ke altrangaj oficistoj en Bruselo povas decidi, sen konsideri la opiniojn de la oficialaj organoj de la Unio, ke dokumentoj estos publikigitaj nur en la angla. La ideo de multlingveco en Eŭropa Unio estas malrespektata.

Same Hector Hodler spitis la Akademion en 1919. Tamen en 1922 estis forta kritiko al tio en la Lingva Komitato kaj UEA realiris al uzado de landonomoj je *-ujo*. Ĝis 1985 Universala Esperanto-Asocio uzis *-ujo* en la jarlibro, sed tiam gvida oficisto Roy McCoy, sen iu interna kontraŭstaro, decidis, ŝanĝi la landonomojn al formoj je *-io*. Ekde tiam ĉiuj dokumentoj uzas *-io*, eĉ verkantoj en la revuo devas uzi ĝin. Ĉu tio estas la libera evoluo de la ĝenerala uzado preskribita de la Akademio en 1974? La evoluo estas grandparte diktata de redaktantoj, kaj debato pri ĝi estas prenata malbone.

La Fundamento de Esperanto kaj la verkoj de Zamenhof entenas sufiĉe da konsiloj por trovi subtenon por raciaj solvoj, kiuj povus kontentigi parolantojn de ambaŭ dialektoj, sed mankas al mi la tempo por eksponi tiujn konsilojn. Racia solvo ne devas esti radikala, ekzemple tute forigi gentobazajn landonomojn. Radikala solvo malrespektas la argumentojn de ambaŭ dialektoj. Ne eblas venko de unu dialekto super la alia, ĉar ambaŭ tendaroj trovas porpartan apogon en la bazaj dokumentoj de la lingvo.

Tial mi volas prezenti al vi nur solvojn kun duflanka gajno. Mi opinias, ke da tiaj ekzistas kvar:

1. „politika“ kompromiso: *-io* por iuj landoj, *-ujo* por aliaj. Nomoj de pluretnaj landoj finiĝas je *-io*: Rusio, Hispanio. Tio ne estas facila solvo, ĉar oni bezonas aplikeblan difinon de pluretneco!
2. fonetika solvo: *-ujo* kaj *-io* malaperas; Rusoj loĝas en Rusio. Ŝajne facila solvo, sed mi pensas, ke oni ne akceptos tion.

2) Rijeka, 6/12-7-2014

1) Komparu la protestojn kontraŭ la ne-antaŭviditaj ŝanĝoj en la germana ortografio

3. etimologia solvo: landoj kies nomo, finiĝanta je *-io* (*-ia*, *-ie* ktp.), estas internacia, laŭ la 15a regulo havos tiun nomon en Esperanto, sed kiel radikvorton. Tio signifas, ke la enloĝantoj de Hungario kaj Rusio estos hungarianoj kaj rusianoj. Aliaj landonomoj je *-io* estas malpermesitaj. Ĉu tio estas stranga? Ne, mi estas tute kontenta esti „nederlandano“ kaj ne „nedero“.
4. gramatika solvo: la gentobaza landonomo, tenas la finiĝon *-ujo*, kiam ĝi estas substantive uzata, sed alpreni *-i* en ĉiuj aliaj kazoj: Hungaria Esperanto-Asocio, serbi-devena kantisto. Tiu solvo havas la avantaĝon, ke ĝi akceptas la distigon inter la adjektivo laŭ nacieco, hungaria, kaj la adjektivo laŭ civitaneco, hungara.

Tiuj, kiuj volas kontribui al disvastigado de la konscio en Esperantujo, ke ni bezonas unuecon en la lingvo kaj tial devas strebi al solvoj kun duflanka gajno por *-ujistoj* kaj *-iistoj*, membriĝu al la retdiskutlisto *klasikaj-landonomoj@yahooogroups.com*.

Du rimarkigoj:

① Zamenhof neniam persone subtenis la uzadon de la sufikso *-io*. Li donis en Lingva Respondo 47 el 1911 plej instruan kaj klaran elmontron de sia persona opinio. Li konsideris ankaŭ landonomojn finiĝantajn je *-io*, sed tiam rigardis tiun finaĵon ne kiel sufikson, sed kiel integran parton de landonoma radikoj. Li hezitis ekzemple inter „Brazilio“ kun „Brazilo“. Li elektis „Brazilo“

kun „Brazilianoj“, ne „Brazilio“ kun „Brazilo“. (Nuntempe ni uzas „Brazilo“ kun „Brazilano“.) Li elektis „Aŭstrujo“ kun „Aŭstroj“ anstataŭ „Aŭstrio“ kaj „Aŭstrianoj“. Estas interese, ke li menciis la eblecon de „Aŭstrio“. Ankaŭ pri „Belgujo“ kaj „Svisujo“ li hezitis, ĉar eble – li opiniis – ili devas esti konsiderataj kiel plurgentaj landoj kun enloĝantoj „belgianoj“ kaj „svisianoj“. Tiu konsidero de Zamenhof motivas min kredi en la supereco de la politika solvo de la problemoj.

② En 1985 la Akademio publikigis Oficialan Informon kun Rekomendoj pri Landonomoj, en kiu ĝi deklaris interalie ke „Principe estas malrekomendite nove formi nomon per(*-io*, *-(i)stano*, ktp.), se la tiel ricevita landonomo ne jam ekzistas internacie.“ Tiu grava limigo de la allaso de la finiĝo *-io* estas apenaŭ konata de Esperantistoj. Same malofte oni agnoskas, ke la finiĝo *-io*, en la termin-uzado de la Akademio ne estas rekomendata kaj ne estas oficiala sufikso. Malgraŭ tiu limigo, allasi la uzon de la finiĝo *-io*, la Akademio publikigis en 2007 liston de Rekomenditaj Landonomoj, en kiu la distingo inter internacieco kaj mal-internacieco de landonomoj estas tute neglektita. Por doni nur du ekzemplojn: la landonomoj Portugalio kaj Ukrainio estas uzataj en neniuj lingvoj en la mondo, nur en Esperanto. Tio signifas, ke en pluraj okazoj la konflikto inter *-ujo* kaj *-io* estus solvita, se oni sekvas la 15an regulon. Nur profunda analizo de la konsekvencoj de ĉiuj kvar proponataj de miaj solvoj povas konduki al honesta komparo de ilia taŭgeco.

Johan Derks

La „Ratkaptista Bando“ kore invitas al la 11-a Rata Rendevuo en Rinteln

Sabaton, la 11-an de oktobro 2014: ĉiĉeronado tra la malnova urbocentro de Rinteln kaj la muzeo „Eulenburg“ („Strigokastelo“), tagmanĝo en restoracio kun elrigardo al la rivero Vezero kaj ĉiĉeronado tra la bando-kaj likvoro-produktejo Schwarze & Schlichte, inkluzive de gustumado de la produktoj. Pli da informoj sur la repaĝo www.esperanto.de/hameln. Bonvolu aliĝi kaj ĝiri la kotizon de 12 eŭroj por la ĉiĉeronadoj ĝis la 10-a de septembro.



Meritplena berlina esperantistino Ina Tautorat 70-jariĝis

Ĉi-jare la 17-an de marto Ina Tautorat, preskaŭ nerimarkite pro sia modesteco, sepdekjariĝis. Multaj en Berlino, sed ne nur ĉi tie, konscias pri ŝia eksterordinara kontribuo al la Berlina Esperanto-vivo.

La hodiaŭ en Esperanto-domo Lichtenberg funkcia Ĵaŭda Rondo estis fondita de ŝi kaj ŝia edzo Hermann jam en 1978 en ilia loĝejo en Falkstraße 25, Neukölln, kaj siatempe fariĝis mondwide konata.

Kiom da esterlandaj Esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo ŝi gastigis? Verŝajne tio ne estas nombrebla, kvankam ekzistas gastlibroj! Kiu ŝatas pli scii pri la gastama atmosfero, legu la kontribuojn de Ina kaj ŝia filino Vera Tautorat en la Jubila Libro de ELB el 2006 pri Ĵaŭda Rondo.

Jam en ŝia loĝejo en Apostelstraße 6 ekde 1974 funkciis Esperanto-butiko kiel renkontiĝejo de berlinaj Esperantistoj. Baldaŭ en Falkstraße 25 ekestis la Esperanto-Centro de Berlino kaj hejmo por la berlinaj Esperanto-biblioteko kaj arkivo - la legenda espoteko.

Kune kun la edzo ŝi savis trezorojn por la berlina Esperanto-arkivo. Multo jam delonge estus perdita sen ilia engaĝo.

13 jarojn de 1977 ĝis 1990 Ina Tautorat gvidis la Esperanto-Ligon Berlino kiel prezidantino.

24jaraĝa ŝi en 1968 lernis Esperanton. Du jarojn antaŭe ŝi edziniĝis al Hermann Tautorat. Profesie ŝi de 1970 ĝis 2008 laboris kiel muzea pedagogino en Juniormuseum (Muzea parto por infanoj) de Etnologia Muzeo en Berlin-Dahlem, ekde 1996 ŝi estris ĝin.

Vidu la broŝuron: *Ina Tautorat, 38 Jahre JuniorMuseum im Ethnologischen Museum Berlin: (ehemals: Museum für Völkerkunde)*, 2008

En la tempo de ŝia prezidanteco ELB sukcese evoluis kaj modernigis. La kvanto de membroj altiĝis de 57 en 1977 al 110 en 1988. Ion pri la malfacileco de ŝia komenco kaj pri ŝia personeco esprimas ŝia unua alvoko kiel ELB-prezidantino.

„Kiel vi legis en pasintmonata *Berlina Informilo*, oni elektis min prezidantino de nia Ligo. Bedaŭrinde mi devas konstati, ke multajn el vi mi ne konas kaj multaj nur malofte vizitas niajn kunvenojn. Sed mi volas kunlabori kun vi ĉiuj! Do mi ege petas vin: Venu al niaj



Ina Tautorat dum solena fermo de la 84a UK 1999 en Berlino post transdono de la kongresa flago al la israela LKK-ano Eran Vodevoz (ĉe mikrofono) apud Kep Enderby, prezidanto de UEA. Foto: Fritz Wollenberg

renkontiĝoj. Eĉ se malnovaj kvereloj kaj poste la kutimo ĝis nun malhelpis vin: Venu! Montru vian interesiĝon je nia komuna afero. Malnovaj disputoj estu forgesitaj. Ni ĉiuj, ĉu junaj ĉu maljunaj devas kunlabori por finfine atingi niajn sukcesojn. Kun bonaj deziroj por 1977 salutas vin Ina Tautorat.“

Berlina Informilo, Marto 1977

Ŝi gvidis trankvile la kunfandiĝon de la esperantistoj en okcidenta kaj orienta parto de Berlino en kontakto kun la estraro de la orientberlina distrikta organizaĵo en GDREA.

En 1993 Ina pro siaj meritoj fariĝis Honara Membro de ELB. Por ŝi tio ne estis signalo ripozi.

Elstaran oficon ŝi akceptis en 1996. Ina fariĝis sekretario de LKK por la 84a Universala Kongreso de Esperanto 1999 en Berlino, post kiam ŝia edzo Hermann, sekretario en la Provizora LKK, subite mortis.

Ina decide kontribuis al la sukceso de la unua UK en Berlino, ĝis nun la plej granda Esperanto-evento en nia urbo.

Ĉar en la loĝejo de la familio Tautorat ĝis 2005 troviĝis la Berlina Esperanto-centro, ni, vizitantoj de la Ĵaŭda Rondo, konsentis la tragikajn kaj ĝojigajn travivaĵojn de la familio de Ina. Ni ankoraŭ tie spertis la ĝojon de Ina paroli kun sia nepino Lara en Esperanto.

Nun Ina ne plu staras tiel centre en la berlina Esperantomovado, tamen ŝi aktive partoprenas, kaj ni povas ĝoji havi tian spertan kaj saĝe kunagantan esperantistinon en Berlino.

Rasisma infan-libro en Esperanto: Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido recenzo de Rudolf Fischer

En konata infan-libro knabo demandas: „Paĉjo, kio estas rasismo?“ Nu, la patro certe respondis, ke rasisto ne toleras homojn, kiuj laŭ deveno, haŭtkoloro, lingvo, aĝo, sekso, mondpercepto, ktp. estas por li fremdaj kaj tial de li traktataj per ĝeneraligo, fifamigo, ridindigo kaj humiligo, se ne persekuto, ĉio tute kontraŭ la spirito de Esperanto. Des pli bedaŭrindas, ke ankaŭ en Esperanta traduko aperis infan-libreto, kiu laŭ la supraj kriterioj sendube estas rasisma.

Temas pri *Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido*. Libro por ĉiuj, kiuj ne akceptas trompojn de Michael Schmidt-Salomon en Esperanto-traduko de anonima „Libera Pensantino“, reviziita de „Poefago, Roland Schnell, Renato Corsetti kaj multaj aliaj“. Pri la enhavo: La porkido volas eltrovi, kie loĝas Dio kaj sekvas konsilon, ke supre sur monto estas tri domoj kun homoj „iom frenezaj“, kaj tiel la porkido kaj ĝia amiko, la erinaco, venas al sinagogo, kirko kaj moskeo, kie akceptas ilin rabeno, episkopo respektive muftio. Ĉiuj tri religiaj gvidantoj tuj indigniĝas pri la naivaj demandoj de la porkido kaj la erinaco kaj kolere forpelas ilin. Postkurante ilin la rabeno, la episkopo kaj la muftio renkontiĝas kaj komencas vorte kaj perforte interbatali. Neniu miro, ke la porkido kaj la erinaco preferas vivi sen Dio, kiu kaŭzas tiajn problemojn.




Tio estas la instruo al malgranda infano, kiu neniam aŭdis antaŭe pri religio: Kredantoj estas „iom frenezaj“ kaj viktimoj de „trompoj“, ĉar Dio ne loĝas en tiuj domoj, sed kruelaj superuloj, kiuj humiligas la aliajn homojn per devigaj religiaj ekzercoj kaj cetero batalas inter si.

La teknike perfektaj bildoj substrekas tiun fifamigon, ĉar oni vidas kolerogrimacajn vizaĝojn de la religiaj gvidantoj, dum la ordinara kredantoj grizkoloraj surgenuas kun tima mieno antaŭ la kruco aŭ formas senvizaĝan amason de klinitaj dorsoj kaj pugoj en la moskeo. Fine venas ankaŭ la mesaĝo de la aŭtoro filozofo, ke la homo estas nur „nuda simio“. Granda bildo kun nudaj homoj do verŝajne havas la celon esti „progresema“.

Nu, bone, pri ĉio ja eblas diskuti, kaj la sinteno, vivi sen Dio, estas same respektenda kiel tiu de kredantoj. Sed la aŭtoro trompas sin mem pensante, ke tia

Schmidt-Salomon, Michael (tekstoj) kaj Nyncke, Helge (ilustraĵoj): „Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido. Libro por ĉiuj, kiuj ne akceptas trompojn.“ Traduko de 2011 de la originalo „Wo bitte geht's zu Gott? fragte das kleine Ferkel. Ein Buch für alle, die sich nichts vormachen lassen (2007). Alibri Verlag, Aschaffenburg. 36 paĝoj, 146 g, ISBN 978-3-86569-141-5.



verkaĉo servas al la ideo de suverena homo sen Dio. Inverse, ĝi donas ja la (malĝustan) impreson, ke „liberpensantoj“ estas same kiel religiaj fanatikuloj rasismaj kaj maltoleremaj, ne kapablaj en paco vivi kun alipensantoj en nia komuna mondo. La kulmino de misuzo de la libreto estas ĝia traduko al Esperanto, kiun Zamenhof kreis por subteni reciprokajn respekton de anoj de ĉiuj mondperceptoj.

Fine restas mencii, ke la traduko estas lingve en ordo, escepte de unu grava eraro en la postskribaĵo, nome „*Gekaraj legantoj ...“. Ke la prefikso „ge-“ nun definitive saltas de substantivo al akompananta adjektivo malgraŭ adjektiveca radiko, estas nova lingva invento.



Herbstwandertage des D.E.B. - ein Dauerbrenner

Wandern wird immer mehr Volkssport: etwas für die Gesundheit tun und gleichzeitig die schöne deutsche Landschaft genießen, das lockt vor allem die rüstigen Alten.

An diese Zielgruppe wenden sich die Herbstwandertage des Deutschen Esperanto-Bundes (D.E.B.), die in diesem Jahr bereits zum vierten Mal stattfinden. Noch kann man vom 19. bis 24. Oktober (Sonntag bis Freitag, 5 Nächte) an der Mosel dabei sein.

In den bewährten Händen von Wolfgang Bohr ist das Wanderprogramm, mit dem die schönsten Abschnitte der Mosel um Zell und Bullay erschlossen werden. Bereits im vorigen Jahr gastierte man auf der Marienburg, aber die Mosellandschaft ist so abwechslungsreich, dass ein zweiter Besuch mit neuen Wegen die Teilnahme auf jeden Fall lohnt. Es konnten bei gleichen Leistungen

sogar noch die Kosten gesenkt werden. Höhepunkt wird diesmal die Besichtigung der legendären Burg Eltz sein, wobei weitere Strecken mit dem Zug zurückgelegt werden.

Nähere Informationen findet man unter www.esperanto.de/ema, wobei leider das elektronische Anmeldeformular wegen des Serverumzugs des D.E.B.-Netzauftritts nicht mehr funktioniert. Man kann sich aber nun einfach ein Anmeldeformular herauskopieren, ausfüllen und per Netzpost einschicken an: gek2014@esperanto.de oder direkt an fischru@uni-muenster.de.

Die Teilnahmegebühr (alles inklusive) beträgt 280 EUR im Doppelzimmer, Einzelzimmerzuschlag 50 EUR. Wer es verpasst, sich einen der gut 30 Plätze zu sichern, der hat im nächsten Jahr wieder eine Chance. Schon jetzt steht fest, dass die 5. Esperanto-Herbstwandertage vom 18. bis 23. Oktober 2015 an der Ahr stattfinden. Zentrales Quartier ist die Jugendherberge Altenahr, alle Zimmer mit Dusche und Toilette.

Rudolf Fischer



Migrogrupo de la 3a EMA ĉe Mozelo.

Foto: Hedwig Fischer

Trierer Weltbürgerfrühstück auch in diesem Jahr mit rheinland-pfälzischen Esperantisten

Am „Weltbürgerfrühstück“ der Lokale Agenda 21 Trier e.V. beteiligte sich Esperanto-RLP wieder mit einem Informationsstand.

Ziel war es, über Esperanto zu informieren und Interessenten für einen Sprachkurs zu gewinnen. Den Stand betreuten Ilona Schmidt-Bohr, Christoph Klawe, Matthias Hecking und Wolfgang Bohr. Die Veranstaltung fand auch in diesem Jahr auf dem Trierer Kornmarkt statt.

In diesem Jahr beteiligten sich nur entwicklungspolitische Organisationen und Gruppen an der Veranstaltung. Viele Stände boten außer Informationen auch Essen und Getränke aus Südamerika, Asien und Afrika an. Auf einer Bühne inmitten der Stände konnten sich die beteiligten Gruppen in einem Bühnengespräch vorstellen. Für uns ging Christoph Klawe, Esperantist aus Trier, auf die Bühne und beantwortete die Fragen der Moderatorin. Dass unser Mann in Trier bei den Besuchern des Weltbürgerfrühstücks ankam, bezeugt der rege Besuch unseres Standes während und kurz nach dem Bühnenauftritt.



Personen auf dem Foto v.l.n.r: Christoph Klawe, Ilona Schmidt-Bohr, Wolfgang Bohr, Matthias Hecking.

Auffallend viele junge Leute kamen und informierten sich über Esperanto. Das Ziel, über unsere Sache zu informieren, haben wir sicher erreicht. Immerhin haben sich fünf Personen in die ausliegende Liste für einen Sprachkurs eingetragen. Vielleicht kommt in Trier ein Kurs zustande.

Wolfgang Bohr

Sukcesa fino de Comenius-Projekto

Du jarojn daŭris la projekto, kiun partoprenis lernantogrupoj bulgara, rumana, itala, litova kaj germana. Ĝia fino estis la 4a renkontiĝo en la rumana urbo Gherla, de la 27a de aprilo ĝis la 4a de majo.



Kiel Comenius-projekto ĝi estis financata de la EU kaj estis kunlaborado pri profesioj kaj kariera elekto.

La lasta renkontiĝo denove kunigis malnovajn amikojn, kiuj dum unu semajno komune laboris, ekskursis kaj festis. La laborlingvo estis Esperanto, kiun lernis la lernantoj dum la du jaroj, ĉefe en nedevegaj laborgrupoj. La komunikado funkciis parte bone, parte malbone, sed kelkaj lernantoj vere bone regis la lingvon kaj intencas gustumi la Esperantomovadon baldaŭ. Resume la projekto estis bona ekzemplo por popolkompreniĝo kaj tuteŭropa kunagado.

Christof Krick

La 17a KEKSO



Kie la junuloj kaŝis sin?

Karaj legantoj,

nun vere venis somera tempo. La homoj ĝuas, aŭ kelkfoje kondamnas, la sunvarmon. Domoj aŭ forte klimatiziĝas aŭ ŝirmas de somera pluvo. Germanio

venkis en la Futbala Mondpokalo (la unuan fojon post la reunuiĝo).

Ke kiel kutime vi ĝuu en tia tempo la legadon de la •kune•, deziras al vi Via redakcio

Timo, Jarno kaj Annika

La Internacia Junulara Festivalo en Italujo

Ĉi tio estas raporto pri la IJF (Internacia Junulara Festivalo) 2014 en Kastel' Sarda, Italujo. Estas mia unua raporto pri Esperanta junulara renkontiĝo, ĉar estis ankaŭ mia unua renkontiĝo (pli granda ol KEKSO).

Mi vojaĝis al IJF kiel oficiala reprezentanto de GEJ. Fakte, tio signifas, ke mi vojaĝis preskaŭ senpage. Do mi certe antaŭĝojis feriojn en varma Italujo kaj la espereblan ekkonon de mojosaj homoj.

La 16an de aprilo mi ekvojaĝis kaj flugis de Dortmund al Alghero. Jam en la germana flughaveno mi rimarkis personojn, kiuj ete konformis al miaj imagoj pri Esperantistoj. Ne surprize, tiu suspekto estis konfirmata, dum mi atendis la buson (kion oni ofte faras en Italujo). Tie, en la itala bushaltejo, kolektiĝis kurioza grupo de homoj kaj mi unue konatiĝis kun Gunnar kaj lia ukulelo.

Komence, mi ne komprenis tiel multe, kiel mi estis esperinta. Sed la aliaj estis helpemaj kaj mi poste rimarkis, ke ankaŭ partoprenis personoj, kiuj komprenis eĉ pli malmulte ol mi. Ni ricevis ĉambrojn en granda gastejo, kiu ne vere estis luksa hotelo, sed la nivelo certe sufiĉis. La plej bona afero estis nia privata strando kun plej pura maro. Je nia alveno ni tuj ricevis unuan provon de la itala talento por organizado. La oficejo ŝajnis iomete kaosa kaj ankaŭ servis kiel eta renkontiĝejo. Plie, amiko kaj mi pasigis la unuan nokton sen littuko.

Mi ne sciis antaŭe, ke mi havos oficon por partopreni senkoste. Feliĉe la „Voĉo“ de la IJF, Michael Boris, klarigis al mi, ke mi havos la honoron helpi en la trinkejo. Sekve, mi ĉiuvespere kunlaboris tie. Tio verŝajne ne vere ne kaŭzis profiton, ĉar la helpantoj rajtis trinki senpage. Cetere, okazis ankaŭ la gufujo dum la vesperoj. Estis la plej eleganta loko kun klasika muziko kaj teo. Dumtage oni ofertis buntan programon. Oni povis (aŭ eĉ devis) partopreni en interesaj kursoj kaj en longaj ekskursoj al Alghero aŭ Anglono. Aŭ oni



nur restis ĉe la strando. Aŭ iris al la urbo. Aŭ serĉis manĝaĵojn...

Krom tio, okazis bonegaj koncertoj vespere. I.a. Amplifiki unue koncertis ekde longa tempo.

Nedubbele: mi ĝojegis partopreni. La homoj moJosegis kaj (precipe la vespera) programo estis amuza. Fine, mi volas menciigi kelkajn aĵojn, kiujn mi speciale memoras:

- La italoj fakte nur manĝas pastaĵojn.
- La italoj ne ŝatas matenmanĝon.
- La tempo en Italujo pasas pli komforte.

La tie-estantaj Afrikanoj ĉiuokaze estis afablaj homoj.

- Ĉiu rigardu/partoprenu inernacian vesperon!

Do, estis mia unua renkontiĝo, sed certe ne estis mia lasta.

Manuel Berkemeier

La 17a KEKSO: Kie la junuloj kaŝis sin?

Samtempe kaj samloke kiel la Germana Esperanto-Kongreso (GEK) okazis la 17a KEKSO. Ĝi estas eta, kreema Esperanto-kurso kaj renkontiĝo por junaj Esperantistoj.

Ni ĉefe estis ekstere, kvankam ni iam babilis kun „plenkreskuloj“, partoprenis en komunaj aferoj kaj vizitis la libroservon. Ĉi tie mi rakontas pri nia semajnfino por la forestantaj junuloj kaj la aliaj partoprenantoj de GEK.

Ĉiutage ni manĝis rost-itajn panojn, legomojn aŭ kuskuson, feliĉe ni trovis rost-fajrigilon post longa serĉado. Strangas, ke ne ĉiu „ĉiovendejo“ vendas tion.

Dum la aranĝo ni komencis traduki malnovajn komiksojn

(kies kopirajto jam finiĝis). Bedaŭrinde tiu projekto estis tro ambicia por unu semajnfino, kvankam ĝi tre utilis por lerni maloftajn vortojn kaj ekzerci nian lingvon. Plie kelkaj novuloj esperantistiĝis, amikiĝis.

Kiam ni ne laboris, ni ĝuis varman sunlumon, diversajn ludojn (Munchkin, Dixit, eĉ Go!) aŭ esploris la urbon. Multaj parkoj invitis nin, la akvo de fontano malvarmetigis niajn piedojn. Aŭ eĉ pli.

Post sunsubiro ni daŭre iris tra Erfurt kaj malkovris pliajn belajn ejojn. Ekzemple la „Krämerbrücke“ (ponto de la komercistoj) altiras multajn homojn. Ili sidis sube aŭ festis en la ĉirkaŭo.

Dum la fina tago ni rostis per niaj lastaj du karberoj. Amikoj foriris – sed ĉiu jam antaŭĝojis pri SES (Slovakio aŭ Rusio), FESTO (Francio) aŭ almenaŭ la venonta KEKSO, Kreema Esperanto-Kurso. Vidu: <http://www.esperanto.de/kekso>

Se vi havas tempon dum aŭgusto, partoprenu en internacia renkontiĝo!

Rolf Sievers



Klasikmuzikaj Kuriozaĵoj

La speco de muziko, kiun la plej multaj homoj konas kiel klasikan muzikon, fakte pli oficiale nomiĝas okcidenta altkultura muziko (aŭ OAM), supozeble ĉar estas sufiĉe granda kongruo inter la homoj, kiuj ŝatas klasikan muzikon, kaj la homoj, kiuj preferas havi klasan societon.

Verdire, en la historio de OAM troveblas ne malmultaj kuriozaĵoj kaj ne tro altkulturaj okazaĵoj... Pri kelkaj vi povas legi ĉi tie.



Pjotr Iljiĉ Ĉajkovskij kaj Ŝarl Kamij Sen-Sans ambaŭ ege ŝatis baleton. Ili ofte kaj ĝoje kune imitis baletistinojn. Unufoje en Moskvo ili surscenejigis, por impresi unu la alian, la mallongan baleton *Galateo kaj Pigmaliono*. Sen-Sans grandioze

rolis kiel Galateo. Por tiuj el vi, kiuj ne konas la rakonton: Galateo estas skulpturo, kiu kompreneble dancis en la baleto.



Edvard Grieg, kiu interalie komponis muzikon por la Ibsen-dramo *Per Gjunt* (*Peer Gynt*), diris la jenan pri unu el la pecoj: „Por la *Halo de la Monto-Reĝo* mi komponis ion, kio tiom fetoras je bovokoto, karakterizanta troan Norvegan naciismon kaj egocentrismon, ke mi mem ne povas elteni aŭskulti ĝin, kvankam mi esperas, ke la ironio ja estas rimarkata.“ La venontan fojon, kiam iu mencias al vi OAM-on, vi havas bonan kialon por rajti paroli pri bovokoto.

Artur Ŝnabel, aŭstra pianisto de la frua 20-a jarcento, iam estis demandata pri la sekreto de sia ludado. Li respondis: „Mi ĉiam atentigas, ke la kovrilo super la klavaro estu levita, antaŭ ol mi ekludas.“





Volfgango Amadeo Mocarto pro siaj tutaj persono kaj vivo meritas propran listopunkton. Nur kelkaj malmultaj el liaj kuriozaj muzikaj kreaĵoj estas: la kanono „Leku mian pugon“ (K. 231); la violonsonatoj K. 379 kaj K. 454, por kiuj li notis la pianopartojn nur post la premieroj; la *Muzika Amuzaĵo* K. 522, kiu ŝercas pri sentalentaj komponistoj; kaj la ario *Kvazaŭ Roko* (*Come Scoglio*): La premierkantistino Adriana del Bene ofte levis la kapon por altaj tonoj kaj faligis la mentonon por malaltaj. Do, Mocarto komponis arion kun multaj grandaj tonsaltoj por povi rigardi ŝin „kapmovanta kvazaŭ koko“.



Lasta punkto: La familio **Baĥ** kiel vaste konate estis sufiĉe granda. **Johano Sebastiano** havis dudek infanojn – aŭ ĉu dudek unu? Peter Ŝikele raportas pri (kaj ludas verkaĵojn de) la sola forgesita filo: P. D. Q. (*Pretty Damn Quick/Sufiĉe Damne Rapide*) Baĥ.

Laŭ Ŝikele, la plej rekonebla karaktero de la muziko de P. D. Q. estas „mania plagiatismo“. Sed kion alian povus fari forgesita filo, ĉu ne?

Timo Pähler



Languages Around the Globe; Esperanto Experiment Lingvoj Ĉirkaŭ la Mondo; Esperanto-Eksperimento


Ekde kiam mi, antaŭ eble unu jaro, ekeniĝis en la interretan komunumon de lingvoentuziasmoj, mia atento pri specifaj lingvoj ĝenerale ege kreskis, sed unu el la plej fascinaj lingvoj, kiun mi ofte kaj ĝoje pridiskutis kaj lernis, estis Esperanto.

Sen tro bonaj ideoj mi antaŭe jam dum kelka tempo provis krei projektojn aŭ eksperimentojn por fondi komunumojn, kiam mi hazarde trovis artikolon de la poligloto Benny Lewis pri la jena fakto: Nur du-semajna Esperanto-lernado tute ŝanĝis lian komprenon de aliaj eŭropaj lingvoj, kaj sufiĉis por enigi lin en fascinan novan komunumon de homoj tra la tuta mondo. Nin ĉiujn allogas la ideo de *pli da gajno por malpli da laboro*, kaj ĝuste tial Esperanto kaptis mian atenton. Kreado de komunuma eksperimento estus perfekta.

Donaskiĝis la LĈLM-Esperanto-Eksperimento. La celo de tiu projekto estas: rekte ekscii, ĉu trisemajna lernado de Esperanto sufiĉas por influi postan lingvolernadon, specife inter plenkreskuloj ne enlernejaj. Por povi fari tion adekvate ni serĉas multajn diversajn homojn kun diversaj lingvaj bazoj, kun diversaj lingvoceloj, kaj kun aŭ sen antaŭscio pri Esperanto.

Jam en la unuaj tagoj pli ol cent homoj esprimis intereson pri partopreno; la eksperimento do aspektis tuj promesplena. Demandaro pri bazaj demografiaj informoj estis sendataj al la respondintoj. Ekzistas neniuj specifaj kondiĉoj por partoprenantoj, krom ke ili

Brian Powers estas la administranto kaj kreinto de Lingvoj Ĉirkaŭ la Mondo (LĈLM; angle: Languages Around the Globe, LATG), interreta komunumo de lingvo-entuziasmoj. Brian publikigas kaj adminstras la LĈLM-blogon ĉe www.latg.org kaj tiurilatajn sociajn komunikilojn. Li vivas en Itako, urbo en la ŝtato Novjorko, kaj akiris bakalaŭrecon de Kultura Antropologio ĉe la Franklin-Pierce-Universitato.



provu fari progreson en la fiksita tempodaŭro. Multaj partoprenantoj jam diris, ke ili planas blogi aŭ taglibumi pri siaj spertoj kaj metodoj tra la Esperanto-lerna tempo kaj dum la sekvantaj kelkaj monatoj.

Ni atendas, ke la rezultoj varios, verŝajne kun granda rilato al haveblaj lernrimedoj kaj individua motivo. Kelkaj homoj havas intereson, post la unuaj 21 tagoj de lernado daŭrigi per latinidaj lingvoj kiel la Hispana aŭ la Franca. Ni ankaŭ havas partoprenantojn, kiuj havas intereson lerni la Ĉinan aŭ aliajn lingvojn ekster la hindeŭropa lingvofamilio (sur kiu ja pleje baziĝas Esperanto). Kelkaj supozas, ke Esperanto pli bone ekipas la lernantojn por lerni eŭropajn lingvojn, kaj malpli bone por lerni aliajn. Interesos do, kion ni observos ĉe niaj ne-eŭropaj lernantoj. Kelkaj el niaj volontuloj jam havas iomete da scio pri Esperanto.

Krucenigmo kun kaŝita proverbo

Solve la antaŭa numero

Konkurso! La kaŝitan proverbon bv. sendi al la aŭtoro: stano.marcek@gmail.com. Unu el la solvintoj (decidos loto, limdato la 25-a de oktobro 2014) ricevos donace la verkon „107 Krucenigmoj en Esperanto“. La premion pro ĝusta solve el *Esperanto aktuell* 3/2014 gajnas Dr. Christoph Brandes el Kassel. Gratulon!

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
A	O	P	E	R	O	U	N	I	K	A	A	A
B	K	A	T	A	R	N	O	D	O	P	L	
C	A	G	A	V	K	U	R	O	M	E	M	
Ĉ	Z	I	P	K	R	A	D	T	I	N	O	
D	O	S	B	L	O	V	C	I	R	O	Z	
E	F	FLA	ME	I	R	I	S	O				
F	AL	I	AN	NE	G	AD	J					
G	R	I	N	G	O	I	R	A	N	O	N	
Ĝ	AL	G	O	U	S	O	N	O	J	E		
H	S	I	R	K	R	U	T	A	D	U	M	
Ĥ	SO	UL	I	N	O	T	O	L	A			
I	T	PL	AN	U	G	O	R	I	L			
J	E	R	AB	I	A	AN	S	E	R			
Ĵ	L	I	E	N	O	P	E	R	D	O	I	
K	I	K	S	O	N	R	O	D	I	A	Ĉ	
L	S	T	A	N	T	E	N	I	T	R	I	
M	T	O	N	P	A	N	O	T	R	O	G	
N	O	J	L	A	S	I	K	R	O	M	A	
O	N	M	I	R	O	S	S	O	N	I	S	

Ni ankoraŭ ŝatus, se partoprenus pliaj homoj kun intereso pri la memstudado de Esperanto, kaj ni kuraĝigas ĉiun interesaton viziti nian retpaĝon www.latg.org. Kun iomete da laboro ni antaŭĝojas eniri tion, kio certe aspektas kiel elstara tutmonda komunumo.

•kune• estas la komuna membro-gazeto de la Germana kaj de la Aŭstria Esperanto-Junularo (GEJ kaj AEJ). Ekde 2011 ĝi aperas kiel interna revueto de *Esperanto aktuell*.

Korespond-adreso: c/o Deutsche Esperantojugend, Einbecker Straße 36, 10317 Berlin.

Retpoŝto: kune@esperanto.de

TTT: <http://www.esperanto.de/kune>

Estraro de GEJ:

Prezidanto: Annika Förster

Pliaj estraranoj: Maximilian König, Janot van der Kolk, Paul Mätzig, Jarno Riefer, Paul Würtz

Adreso de GEJ:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, Germanio.

Tel.: +49 30 42857899

Retpoŝto: dej@esperanto.de

TTT: <http://esperanto.de/dej>

	UNUA PARTO DE LA KAŜITA PROVERBO	TRANS-IREJ' SUPER RIVERO	PARTO DE LA NAZO	SIMBOLO DE KOBALTO	SUB-STANTIVA FINAJO		DUA PARTO DE LA KAŜITA PROVERBO
TRI-DIMENSLA SENLIMO						SIMBOLO DE KALIO	
BRITA MEZUR-UNUO DE LONGO					PREPOZICIO (proksimigo)	TRO	
FEMALO				ASOCIO DE VERDUJOJ E-ISTAJ ISLAMA PRINCO	RIZA BRANDO		
MAL-GRANDIGA SUFIKSO		NEKO-REKTAJ' SPIC-HERBO					
SIMBOLO DE NITRO-GENO		MAL-DOLĈE TROPIKA ARBUST'					
SEN-HONTA MAL-DECEC'							
MUZIKA TEAT-RAJO						NULO	GRANDA GRUPO, AMASEGO
TON-SIGNO					MEMBR'	SKANDI-NAVIA KOBOLDO	
UNUO DE ELEKTRA REZIS-TANCO				PLI OL SUFICE HELENA DIO DE MILITO			
MAL-KON-SENTO			CIRKA PREZENTEJ' ANTAŬ-PAGO				
INFINITIVA FINAJO		MAL-HUMLE POSTULI KONTRAŬE OPINII					
MALKOV-RINTON DE DINA-MITO							
RAKONTA POEZIO						ADVERBA FINAJO AMBAŬ-FLANKA TIRISTRON'	
PAGILO					TELEVIDO SUBKLASO DE MAMULOJ		
JAPANA MON-UNUO				EN ALTA GRADO ESTIGI, KAŬZI			
SIMBOLO DE NIKELO			SUPER-NATURA INA ESTAJ' DUOP'				
ROMANE „500“		SOLENA MARS' PREFIKSO (DU SEKSOJ)					
RILATA AL BLANKA MANGEBLA FUNGO							
KOLEKTO, SINSEKVO						SIMBOLO DE SULFURO	

Rimarko de Detlev Blanke: Sur la impona foto pri la Diservo en Erfurt, kiu aperis sur la lasta kovrilpaĝo de *Esperanto aktuell* 3/2014, oni mencias la protestantan pastron Corinna Schwaiger kaj la katolikan pastron Albrecht Kronenberger. La tria persono maldekstre antaŭ la altaro estas la protestanta pastoro Peter Bäß el Berlino.

**XXVIII-UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO EN WIEN 1936**
8.-15. (15.-18.) AŬGUSTO.





XII-A SOMERA UNIVERSITATO
„KULTURAJ KAJ EKONOMIAJ PROBLEMOJ DE MEZ-EŬROPO“
INTERN. KONFERENCO DE VIRINOJ
VOJAĜO „TRA AŬSTRIO“
SALZBURG - WIEN - SEMMERING - GROSSGLOCKNER - SALZBURG
ĈARMAJ URBOJ - NEĜKOVITAJ MONTOJ - BLUAJ ALPOLAGOJ - DANUBO
FESTARANĜOJ
KOSTUMBALO: „LA KONGRESO DANČAS“
OPERETO: „LA BIANKA ĈEVALETO“
KONGRESEJO: LA FESTAĜONEGOJ DE IMPERISTRA KASTELO „HOFBURG“
ADRESO: ESPERANTO-KONGRESO - WIEN - NEUE BURG.

1^A KONGRESO INTERNACIA
DE KATOLIKOJ
ESPERANTISTAJ
ĈE
L' INSTITUT
CATHOLIQUE



PARIS
3^{AN} DE MARTO
3^{AN} DE APRILO
1910

**25. Universala
Kongreso de Esperanto
Kolonjo 1933**
29. Julio - 5. Aŭgusto



COLOGNE

RÜGER



ESPERANTO

*Hansi-
Ĉokolado
kakao*



reĝa kaj imperiestra
liveranto